

La Esperanto-Gironde Informilo

NOVEMBRO 2018



N° 156

Ni ĝuu aŭtunon!



ESPERANTO-GIRONDE KUNVENO EN CREON LA 10an DE JUNIO 2018 je la 10a 30

Ceestis: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Edelbloude, Bruno Ferré, Gloria Gargallo, Peio Labbé, Joël Lajus, Annie Perrin-Brilleaud, Klodin' Pomirolo, Marcelo Redoulez, Morine Stride.

Elvezio bonvenigas ĉiujn kaj dankas al Morine kaj Peio pro ilia gastemo.

1/ Bilan financier de la Maja Festo (Morine)

Il y a eu au total 51 participants à la fête + 7 invités. Total recettes inscriptions : 2622,50€

Les dépenses se sont montées à 5057,20€.



Le virement de 870€ de la mairie de Cambes est arrivé.

Nous attendons la subvention de la mairie de Cenon : 1500€ ; le règlement des repas des participants syndicalistes : 95,20€ ; la participation financière de SUD : 300€.

Par ailleurs, Françoise Guilhaumé a pris 25 CD de Brel et 10 de Moriza pour les vendre.

Françoise et Gilbert ont fait un don de 30€.

La vente aux enchères a rapporté 214,30€ et nous avons vendu pour 224,50€ de livres.

Le déficit total est de 243,50€ (le budget tablait sur un déficit de 450€).

2/ Rapport moral

Les retours ont été très positifs.

On peut envoyer le LEGI à tous les participants par mail.

On pose la question de l'impression en couleurs pour l'envoi postal ; cela risque de coûter deux à trois fois plus cher. Marcelo peut prendre en charge l'impression couleurs.

Martine : L'organisation était parfaite ; beaucoup de créativité, d'aide, de chaleur, d'amitié. Beaucoup de bonne humeur dans la préparation et le déroulement. A admiré l'énergie de Morine. A beaucoup aimé chanter les canons avec **Kajto**.

Annie : A passé deux jours très agréables. A fait des progrès en espéranto et a l'intention d'être plus régulière aux cours du lundi. Touchée par l'accueil chaleureux. S'est sentie encouragée, emportée dans un courant positif. A apprécié les enchères, le discours d'Elvezio, la visite des Bassins à flot. Remercie pour ces moments riches et chaleureux.

Gloria : Tire son chapeau pour le travail qui a été fait (par exemple les sacs). La fête a été une réussite grâce au travail préparatoire. A beaucoup apprécié les diapos sur les fleurs. Le concert de Kajto à Cambes était magnifique et faisait chaud au cœur.

Elvezio : Est content que deux élèves de son cours soient venus et remercie pour l'accueil qui a été fait à Clément (qui est en attente d'un poste à Rotterdam pour TEJO dans le cadre du service civil international). A apprécié la solidité de l'équipe ; la variété et la richesse des activités ; la très bonne organisation ; l'ambiance à table ; les discussions. Il remercie l'équipe pour tout.

Il propose un jumelage entre Cenon et Herzberg.

Ce sera à étudier et à préparer très soigneusement. Cela prendra du temps.

Joël : A apprécié la pertinence du discours d'accueil d'Elvezio, avec la présence du maire et Kajto, qui a entraîné le public même non espérantiste. A apprécié aussi la



journée avec les syndicalistes ; il sera intéressant de voir ce qu'il en reste par la suite. Très intéressant de profiter des activités d'Espéranto-Gironde pour mêler un public non espérantophone. A trouvé très intéressante la visite des Bassins à flot : il était intéressant d'avoir une guide expérimentée, professionnelle. A aimé la bonne am-

bianche, la chaleur humaine. A conscience du travail qu'il y a eu derrière.

On se demande s'il y a lieu d'envoyer le LEGI 154 aux syndicalistes ayant participé à la journée de formation. Les avis sont partagés.

Marcelo précise que le forfait de l'inscription à la journée de formation incluait l'adhésion à l'association.

Marcelo : Les syndicalistes ont été très attentifs et ont reçu beaucoup d'informations dans la journée. La présence de Franck a beaucoup apporté à la discussion. Parmi les participants, six souhaitent apprendre l'espéranto. Marcelo a été relancé pour commencer un cours. Le problème est qu'ils sont sur des territoires éloignés et que Marcelo ne les rencontre qu'une fois par mois. Peut-être utiliser lernu.net.

Cette journée syndicale é été obtenue de haute lutte ; maintenant Solidaires national est dans la boucle. Cela n'avait jamais été fait auparavant au niveau de SAT-Amikaro.

A rencontré des difficultés auxquelles il n'avait jamais été confronté avant, que ce soit avec la mairie de Cenon, la CGT, le Centre Culturel etc., et les décisions positives ont traîné (mairie de Cenon, Libertaires...).

La réussite de la fête est due au groupe, où chacun a fait ce qu'il a pu. Merci à tous.

Constat : le groupe de 2018 n'est plus celui de 1992. Il faut faire prendre conscience au niveau de la mairie de Cenon de la place de l'espéranto dans la commune.

Si on a eu les portes ouvertes, gratuitement, c'est parce que les contacts avec les élus et les acteurs culturels ont été réguliers et insistants. Il est important de faire savoir que l'on existe dans les services, au niveau des adjoints. Les collègues du service documentation et communication ont bien fait leur travail. A Cambes, la ville s'est bien



prêtée au jeu (réponse favorable des élus, accueil des artistes par le maire et l'adjointe à la culture).

On voit individuellement les défauts, les frustrations... qui empêchent de voir le positif. L'organisation a été très difficile ; des problèmes sont apparus pendant la réalisation ; mais ce qui importe c'est le sourire de ceux qui ont participé.

Morine : Les difficultés se sont présentées par des défauts de communication entre les organisateurs ; il n'était pas toujours facile de savoir ce que Marcelo avait en tête. S'est sentie parfois un peu à côté ; sentiment de n'avoir pas pu donner tout ce qu'elle pouvait apporter. Il aurait peut-être fallu réduire les instances de décisions urgentes au CA, puis faire descendre l'info.

Peio : Il y a eu des profiteurs, des escrocs : certains n'ont pas payé leurs cafés. Certains discutaient pendant les chants, les conférences...

Gloria : Informe qu'elle a reçu un courriel du groupe libertaire réclamant 10€ de participation à la location de la salle le jeudi soir.

Or nous n'avons jamais été informés que la salle devait être louée aux frais d'Espéranto-Gironde... et d'ailleurs nous n'avons fait que répondre à une invitation qui nous a été faite par l'UPB.

On discute pour savoir si Espéranto-Gironde paiera ou non. Il est finalement décidé de demander une facture. Gloria transmettra la décision au groupe libertaire.

Après le repas, les discussions et échanges d'informations reprennent.

Elvezio : A fait des démarches pour que le cours d'espéranto devienne officiel à l'université. A rencontré une responsable fin avril qui s'est montrée réticente (l'espéranto n'est pas une langue de communication ; si l'on ouvre une première année, il faudra prévoir une deuxième puis une troisième ; l'espéranto serait plus à sa place dans un autre cadre où l'on pourrait présenter tout ce qui est culture, histoire...).

Il faut donc trouver une formule nouvelle et le projet n'avance pas. Deux autres responsables ont été contactés ; ils se sont montrés plus favorables, mais ils n'ont pas pouvoir de décision. Attend un rendez-vous avec la présidente de l'Université.

De toute façon, le cours en soirée continuera. Il faudra recommencer les démarches à la rentrée pour motiver de nouveaux étudiants.

Morine : A présenté l'espéranto fin mars à la mairie de Créon ; il y aura un stand de l'espéranto au forum des associations en septembre. Les TAP continuent. Le maire est intéressé par l'espéranto.

Elvezio : Bernard Vidal a fait une présentation de l'espéranto à Gujan-Mestras, mais il n'y avait pas beaucoup de personnes présentes.

Jean-Seb : Aurora a un projet de film (environ 15 min.) avec Elvezio, Annie. Rendez-vous le 24 juin. Le scénario est écrit en français et en espéranto.

Joël : Il y a quelques années, le groupe de Galgon avait eu un projet similaire, un scénario avait été écrit (dans le but de faire connaître la région), mais les difficultés ont commencé quand il a fallu jouer en espéranto.

Martine : Favorable au projet de jumelage avec Herzberg, veut bien s'occuper de faire des recherches sur les conditions d'un jumelage.

Marcelo : Il y a eu des échanges de groupe à groupe avec Vitoria (Pays basque), Düsseldorf, Bakou (Azerbaïdjan) mais ces échanges se sont distendus au fil du temps.

Morine : Comme il y a toujours des problèmes avec la Banque postale, va voir avec le Crédit Coopératif : il faut prendre des parts sociales qui sont reversées à l'association humanitaire de son choix.

Monique annonce qu'à partir de septembre elle prendra une année sabbatique.

La date de l'AG est fixée au 14 octobre.

Janine



TROPEOLO

Tropeolo (*Tropaeolum majus*) devenas de Sud-Ameriko kaj de Meksiko.

Ĝi nomiĝas ankaŭ Perua aŭ Meksika kreso.

En la 12a jarcento konkistadoroj enportis ĝin en Eŭropon kaj ĉiujn kontinentojn pro ĝia ornameco. Ĝi estas unujara planto.

Tradicie tropeolo utilis kiel spico en salato pro sia pipreco kaj, dum antaŭkolumba erao, ankaŭ kiel kontraŭvunda kuracilo.

La baktericida kaj fungicida ecoj de specifa molekulo, kiun ĝi entenas, pravigas uzadon de tropeolo ĉe haŭtafekcioj. Tiu molekulo estas forigita tra la renoj kaj antiseptike efikas ĉe la urina sistemo. Tropeolo entenas ankaŭ la altvaloran C-vitaminon, kiun ni ĉiutage bezonas.

Ni povas do tute senriske aldoni tiujn beletajn florojn en niajn salatojn ne nur por ornami ilin sed ankaŭ por nia sano. Ankaŭ la folioj manĝeblas, tial ĝia kromnomo «kreso».

Surhaŭta uzado:

Tropeolo estas uzata kadre de jukado, de deskvamiĝo de la kраниhaŭto kaj haŭtafekcioj, sidvangaj aŭ prosunaj eritemoj, surfacaj brulvundoj.

Pistu kelkajn tropeolajn florojn kaj foliojn kaj sternu la kaĉon sur la koncernata parto.

Singardoj:

Atentu: Grandkvanto da ingestita tropeolo kaŭzus gastrajn, intestajn, renajn iritojn.

Prefere ne sekigu tropeolon ĉar tiam ĝi perdos efikon.

Morine

Traduko de la cenona grupo.

Fontoj: *Plantoj kiuj kuracas* de Jacques Fleurentin.

FOR LA MORTPUNO!



Jes, ja, sed mi deziras paroli pri speciala pasinta mortpuno, kiu okazis antaŭ Ĵirkaŭ cent jaroj: la ekzekuto de soldatoj pafataj por servi kiel ekzemplo al la aliaj dum la unua mondmilito. De pluraj jaroj mi prie parolas okaze de la 11a (aŭ 10a) de novembro, kutime sur placo Jean Jaurès en Bordojo. Tie, parolas la Nacia Federacio de la Liberpensoj, la Respublikana Asocio de Eksbatalantoj, la Ligo por Homaj Rajtoj, kaj la Franca Pacista Unuiĝo; kelkfoje ankaŭ venis la Ligo pri Instruado.

Ni ĉiam diras la samon: S-ro Prezidento, bonvolu, fine, rerajtigi kaj honorigi la 639 pafitajn virojn; iliaj nomoj indas esti skribitaj sur la monumentoj, kiuj staras en ĉiuj komunumoj. Ili ja estis veraj viktimoj, viktimoj de la milito; sed ili mortis per la kugloj de siaj kolegoj, ne de la Germanaj «malamikoj».

Tiu batalo por la rerajtigo komenciĝis tuj post la fino de la milito, ĉar ili estis senkulpaj; ili estis lotitaj laŭ la petoj de generaloj, la plej fama el tiuj nomiĝis Pétain.

Ni pensis, ke la batalo ĉesos, kiam socialista prezidento estis elektita. Ni tute malpravis! Kaj tiu prezidento eĉ ankoraŭ pli kontraŭstaris tiun decidon ol la antaŭa. Lia respondo estis: «Ili malplenumis sian devon».

Do, venontan novembron, mi denove iros al la manifestacio, kaj estus pli bone se kelkaj esperantistoj venus, kaj, kial ne, kun esperanta flago.

Bernardo

ĜENERALA ASEMBLEO DE ESPERANTO-GIRONDE.
DIMANĈON LA 14AN DE OKTOBRO 2018
JE LA 10A 30
EN PESSAC

Ceeastas: Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Thérèse Cayatte, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Edelbloude, Hélène Forget, Peio Labbé, Joël Lajus, Klodin' Pomiról, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Morine Stride, Bernard Vidal .

Senkulpigitaj: Aurora Lopez, Ge-Jagueneau, Lucienne Laroche, Gloria Gargallo.

Elvezio dankas al Jean-Seb pro la gastigado.

1. Agad-raporto (fare de la sekretario)

Depost la lasta ĝenerala asembleo en Créon, la 8an de oktobro 2017:

- Okazis 7 kunvenoj

- la 11an de novembro; la 17an de decembro; la 11an de februaro; la 11an de marto; la 3an de aprilo; la 29an de aprilo; la 10an de junio. La plejparto de la kunvenoj rilatis al la jubilea festo.

- LEGI

Dum tiu jaro, la membroj de Esperanto-Gironde ricevis 4 numerojn de LEGI (de nro 152 ĝis 155).

- Aliaj okazaĵoj

- Dank'al la klopodoj de Morine, ni akiris belegan vertikalan flagon kun la nomo kaj la logotipo de Espéranto-Gironde.

- La asocio alportis gravan monhelpon en la realigo de la KD de la Kompanoj (FaMo, Bernard Legeay kaj Pjer Bouvier).

- Kreiĝis fare de Morine la retejo de Espéranto-Gironde (blogoj)

- Estis kreita filio de Espéranto-Gironde en Montendre.

- En decembro ni festis la centjariĝon de Laura Vieillefond.

- Sed ni devis fronti malagrablegajn okazaĵojn, t.e. la forpason de Laura, okazintan la 1an de aprilo kaj tiun de Louissette Levreaud, okazintan la 21an de aprilo.

- La kursoj daŭris ĉijare en la universitato, gvidataj de Elvezio kaj Jean-Seb. Notinde estas, ke Clément, eksa studento de Elvezio kaj Jean-Seb pri Esperanto en la universitato, laboras porTEJO en Roterdamo, kiel volontulo.

- La plej grava evento de la jaro estis la jubilea festo en majo (de la 2a ĝis la 7a), en kiu partoprenis 60 aliĝintoj, inter kiuj kvaropa Kajto.

- Espéranto-Gironde partoprenis en la Festo de la Lingvoj en la universitato.
- En septembro estis kreita la asocio Espéranto-Créon, kaj la urbestro bonvenigis la proponon ekinstrui Esperanton al la infanoj, kadre de la «TAP» (Morine, Peio, Thérèse). Plie, tri plenkreskuloj montriĝis interesataj por lerni.

La agadraporto estas unuanime aprobita.

2. Financa bilanco (fare de la kasisitino)

Après le versement de la subvention de la municipalité de Cenon, le bilan de la fête est déficitaire de 3,50€.

Compte courant : 1844,78 €

Livret A : 3000 €

Au cours de l'année 2018, Espéranto-Gironde a changé de banque. Désormais les comptes sont au Crédit Agricole, ce qui aura une conséquence favorable, puisqu'il n'existe pas de frais de tenue de compte.

En 2018 il y avait 27 membres (en tenant compte des nouveaux inscrits du groupe de Montendre).

Le rapport financier est approuvé à l'unanimité.

3. Atingoj kaj projektoj

- Okaze de la Universala Kongreso en Lisbono:

- Aurora trapasis ekzamenon kaj tre bone sukcesis.
 - Fabrice Morandeu ricevis diplomon pro «Elstara arta agado por Esperanto». Li skribis al Marcelo kaj Klodin', ke li preferus, ke la diplomo estu dediĉita al ni ĉiuj, sen kiuj li ne povus atingi tiun profesian nivelon.
 - Neniu KD de Moriza vendiĝis, sed la 25 KD de Brelkazonoj ja vendiĝis.
- Bernardo Sarlandie verkis artikolojn pri la lisbona UK por la [Facebook-paĝo](#) de Espéranto-Gironde.

Pause déjeuner de 13h30 à 15h.

Arrivée d'Annie Perrin-Brilleaud.

- Projektoj:

- La ĉefa projekto rilatas al la agado en Créon.

Morine, Thérèse et Peio projektent d'aller en stage à Grésillon.

Il est prévu de présenter l'espéranto au collège. D'autres perspectives se présentent avec l'ouverture d'un lycée à Créon en 2020.

L'objectif national est d'arriver à une trentaine d'établissements scolaires où est enseigné l'espéranto, pour que le ministère de l'Éducation Nationale prenne au sérieux l'objectif de l'espéranto au bac.



- La kursoj en la universitato plu okazos (6 ĝis 8 studentoj).

- La blogo: Morine ne plu havas tempon por ĝin mastrumi; do de nun mankas mastrumanto.

Klodin' rimarkigas, ke multaj ne kompetentas pri tiu materialo.

Les administrateurs étaient jusqu'à maintenant Morine, Yannick et Janine, Marcello, Bruno. Janine ne visite presque jamais le blog : il faudrait faire un transfert d'adresse du blog à l'adresse personnelle habituelle.

Jean-Seb souhaite y apporter des contributions et créer un forum de discussion. Il faudra donc l'inscrire comme administrateur.

Le problème avec les forums de discussion est qu'il faut un modérateur (modération *a priori*).

Annie pense que le spécialiste informatique de l'association où elle est bénévole pourrait aider.

L'hébergeur est OVH (Blog Wordpress).

- Projekto pri ĝemeligado de Cenon kun Herzberg. Martine vizitis la retejon de Hertzberg. La afero estos verŝajne tre malfacila. Unue: per kio komenci? Eble viziti forumojn pri ĝemeligado de urboj.

- Kursoj:

Galgon: vendrede de la 17a ĝis la 19a; 7 partoprenantoj

Gujan: same, kiel la antaŭa jaro

Cenon: same

Créon: lunde de la 15a30 ĝis la 16a45 (TAP)

Montendre: same

Pessac: la ĉijara celo estas la esperantigo de la dialogoj de la filmeto por subtitoloj.

Universitato: mardon, je la sama horo, en la salono C 009.

4. Renovigo de la komitato

Composition du conseil d'administration depuis l'assemblée générale du 8 octobre 2017 : Jean-Sébastien Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Monique Dusenty, Morine Stride.

Morine Stride est démissionnaire.

Les autres membres du conseil d'administration sont candidats à leur réélection.

Martine Edelbloude présente sa candidature.

Tous les candidats sont élus à l'unanimité.



Composition du conseil d'administration :

- Jean-Sébastien Brilleaud
- Elvezio Canonica
- Janine Dumoulin
- Monique Dussenty
- Martine Edelbloude

5. Diversaj demandoj

- Archives : il faudrait pouvoir les stocker à Palmer.
- Cotisations : pas de changement :
 - 17€ pour un individu
 - 23€ pour un couple
 - Une association extérieure paie une cotisation individuelle.
- Marcelo proponas, ke Espéranto-Gironde donacu la restantajn KD-ojn de Moriza al Espéranto-Créon, por helpi en la fundado de la asocio. Aprobite.
- Il reste deux caisses de disques de chansons de Brel.
- Renata Chassard forpasis fine de septembro: ŝiaj libroj estas je la dispono de ĉiuj, ekzemple por la universitato.
Monique transloĝiĝas, kaj donacas plurajn el siaj libroj. Ŝi kunportis du skatolojn.
- La universitato akiris plurajn librojn pri Esperanto. Estas nun pli ol 100 slipoj.
- La Zamenhof-tago okazos la 16an de decembro, se eble en Cenon Palmer (konfirmota).

La asembleo estas fermita je la 16a30.

Élection du bureau

Le conseil d'administration se réunit à 16h30.

Sont élus à l'unanimité :

Président : Elvezio Canonica

Trésorière : Martine Edelbloude

Secrétaire : Janine Dumoulin

Janine



NOVA FEJSBUKA GRUPO!


Ĵus naskiĝis nova fejsbuka grupo : **Espéranto Université Bordeaux Montaigne**. Ĝi estas la plej rekta vojo al la tuta studentaro, kaj tio ebligas min komuniki ankaŭ aliajn aferojn rilate al Esperanto, ĝenerale, kaj por diskonigi nian asocion (mi jam metis ligilon al la retpaĝaro de Espéranto-Gironde).

Elvezio

Post Havano kaj Hanojo, Lisbono estis nia tria Universala Kongreso. Ni iris tien kune kun Aŭroro, al kiu mi parolis pri Esperanto antaŭ kelkaj jaroj. Ŝi partoprenis kun la celo trapasi B2 ekzamenon.

Sed ni, kiel kutime, intencis viziti la ĉirkaŭaĵojn de la portugala ĉefurbo, ĉar ni jam vizitis la landon plurfoje, kiam Guilhem studis tie.

Mi estis sola por la unua ekskurso, ĉar Rose estis malsana. Feliĉe ĉar ni multe grimpadis kaj marŝis. La ekskurso komenciĝis en la Placo do Rossio. Ni vizitis vinkafejon por «tapas» kaj ruĝa vino. Ni daŭrigis al tradicia manĝaĵvendejo por gustumi Porto-vinon kun marmelado kaj fromaĝo. Poste ni vizitis tipan tavernon, kie ni ĝuis moruan kuketon kun verda vino. Ni ankoraŭ trinkis surstrate tipan ĉerizan likvoron de Portugalio (*ginja*) kaj finis la ekskurson per tradicia manĝaĵo akompanata de ruĝa vino ĉe Casa do Alentejo, tute proksime de la Coliseu, kie estis okazonta la nacia vespero. Bela programo, ĉu ne?



Placo do Rossio



La impona palaco de Mafra

London, ni elektis Mafra-n, kie ni vizitis la imponan palacon/monaĥejon de la 18-a jc. En la komenco, estis simpla domo por 13 franciskanaj monaĥoj kaj ĝi iĝis enorma konstruaĵo por 300 homoj kaj unu el la plej belaj bibliotekoj en Eŭropo (simile al tiu de Koimbro), kiu entenas pli ol 36 000 librojn.

Revenante, ni haltis en Ericeira, fiŝista vilaĝo staranta sur klifoj, borde de la oceano.



Merkredon, la kongreso vakas. INOE, Internacia Naturista Organizo Esperantista, organizis ekskurson al naturista plaĝo, sed ni jam registriĝis por tuttaga ekskurso al Azeitão, en la Arrábida-montetaro. Ni vizitis azuleño-fabrikon kaj pentris nian propran azuleñon, kiun ni ricevis la sekvantan tagon en la kongresejo. Ni daŭrigis per la vizito ĉe vinfabrikanto, kie ni gustumis tri lokajn vinojn, kaj aĉetis *Moscatel de Setúbal*. Ni tagmanĝis en la turista urbo Sesimbra.



Azeitão



Arrábida Montetaro

Ĵaŭdon, ni decidis partopreni en la ekskurso nomata «Arrábida». La prezentado diris: «La montetaro estas natura rezervejo kaj havas mediteranean mikroklimaton. Ĝi estas vera verda paradizo. La ekskurso montros la plej belajn vidaĵojn de la regiono». TUTE NE! Ni ne haltis en tiu rezervejo kaj la vojo estis la sama kiel la antaŭan tagon. Ni bedaŭris la pagon por tiu duontaga ekskurso.

Feliĉe ni tre ŝatis la vespermanĝon kun koimbra fado vendredon, post kariljono-koncerto sur la placo de urbodomo: bona propagando por Esperanto.

Kompreneble, ni ankaŭ partoprenis en diversaj renkontoj dum la kongreso, i.a. INOE kaj ATEO (**A**teisto **T**utmonda **E**-Organismo). Kaj evidente ni aŭskultis diversajn altnivelajn koncertojn.

Tre verŝajne ni ne partoprenos en la kongreso en Finnlando venontan jaron, sed eble, se ni havos sufiĉe da mono, ni iros al Montrealo (kiun ni vizitis en 2008).

Bernardo k. Rose



Portretateliero gvidita de kamarado HO Song

Kamarado HO Song el Suda Koreio proponis montri kaj instrui, kiel realigi karbokrajonan portreton de L. Zamenhof laŭ fotoj.

Deko da scivolemuloj interesiĝis. Antaŭ ol komenci kopion de portreto, gravas scii kelkajn informojn pri proporcioj de vizaĝo por bone loki la



diversajn elementojn: okuloj, buŝo,

nazo, oreloj, haroj. Kaj ekkomencu. HO Song profesie kaj pedagogie gvidis ĉiun unu post la alia, helpante korekti erarojn. Li montris, kiel ombri, stompi aŭ heligi partojn fingrefrotante aŭ frotgumante. Rigardante, ŝajnas simple pretigi la artaĵon,

tamen iom da praktiko kaj trejnado utilas.

La ateliero bone disvolviĝis en simpatia etoso kaj post unu horo la portretoj estis preskaŭ pretaj. Amuze estas konstati siajn nigrajn karboplejnajn fingrojn fine de la ateliero. Evidentiĝas, ke ĉiu artisto elmontris laŭ propra inspiro kelkajn variantojn.

Jen la rezulto.



Klodin'

TUTPEKO de la 24a de februaro ĝis la 3a de marto 2018

Kiel pasintjare, je la sama epoko, mi ĉeestis la 25an staĝon pri pirenea esperantista ĥoro en la ĉarma vilaĝo La Bastide sur l'Hers en Ariège, organizita de Jorgos, 25 jaroj speciale honorigitaj de la grupanoj dum la lasta vespero.



Kiel en 2017, nia ĥorestrino estis Rineke Haens el Nederlando. Ŝia instrumentodo komence iomete maltrankviligis min: efektive ni unue trejnadis per melodioj, saltante de kanto al alia. Mi havis la impreson de troa rapideco, sed, iom post iom, ofte revenante al la jam lernitaj partituroj, ni sukcesis bone koncerti per 13 kantoj semajnfine. Kaj denove ni ekzercadis niajn voĉkordojn per la finnlanda metodo

Lax Vox: tra speciala tubo oni blovas en botelon duonplenigitan per akvo. Mi sentis la favorajn efikojn por malstreĉigi la gorĝon kaj mi promesis al mi ekzerciĝi hejme.

Ni unue koncertis en la loka maljunulejo. Poste en la vilaĝo Dun, kie ankaŭ rolis la «Cor de Cantarata», dinamika okcitana ĥoro. La tria koncerteto okazis la lastan vesperon, en mezepoka vilaĝo Fanjeaux en la departemento Aude, meze de la katara regiono. Ni profitis de sagacaj klerigoj de Brigitte, ĥoranino kaj enloĝantino de tiu loko. Partoprenis ankaŭ en tiu festa vespero «AR VAG Gruissanot», energia grupo de ĉirkaŭ 25 gekantistoj, estritaj de saltanta Pierrick, kiuj kortuŝis kaj amuzis nin per maraj kantoj.



Pri la vetero, grande surprizis nin la tempestoj kaj neĝfaloj okazintaj ĉirkaŭ ni (ni sciis tion per la gazetoj kaj la «smartfonoj»!). Efektive ĉiutage brilis la suno en blua ĉielo! Nur dum lasta nokto tempestis sed ĉio estis en ordo matene kaj ni foriris kun printempa mildeco.

Ni ankaŭ vizitis la memfaritan «pajlan domon» de Claude, produktistino de ekologiaj suktoj, konfitaĵoj, vegetalaj pasteĉoj. De ŝiaj ĝardeno kaj fruktarbejo, ni superstaras la belegan kaj grandan lagon de Montbel. Paradiza loko.

Mi ne forgesas la pentriston Pierre, kiu dank'al siaj pentraĵoj, rakontas siajn vojaĝojn per Esperanto.

Grandan dankon al Rineke pro ŝiaj rideto, pacienco, kompetenteco, kaj ŝiaj kuraĝigoj ĉiam bonvenaj, en ĝoja etoso.

Ankaŭ al la kuirej-skipo Annemie kaj Brigitte, kaj al ĉiuj helpantoj.

Monique

KIO ESTAS LAX VOX?

KIO ESTAS LAX VOX?

La metodo Lax Vox origine populariĝis en Finnlando. Iu sinjorino Sihvo re-enkondukis ĉi tiun malnovan metodon, ĉar ŝia voĉkliniko havis tro longan atendoliston por novaj pacientoj. En la kliniko laboris nur unu sola voĉterapiisto, kaj tial oni decidis mallongigi la terapion de 20 aŭ pli da sesioj al nur 5 sesioj. Por ebligi tion oni ekuzis la klaran kaj facile kompreneblan holisman metodon de Lax Vox. Tiel ne plu necesis diversaj izolitaj ekzercoj. Pacientoj povis mem hejme plenumi voĉplibonigajn ekzercojn.

La esenco de la metodo estas simpla: tra speciala tubo oni blovas en botelon kun tavolo da akvo. La blovado kaj aktivigo de la voĉo ŝanĝas la premon super la voĉkordoj kaj arte plilongigas la voĉkanalon. Sekve oni bezonas krei malpli da premo por aktivigi la voĉon. La tensio de la muskoloj ĉirkaŭ la laringo malpliiĝas, kaj pro vibrado liberigas ĝena muko. Oni akiras pli vastan voĉregistron kaj la kvalito de la voĉo plibonigas. La granda avantaĝo de ĉi tiu metodo estas ĝia facileco. Multaj profesiaj parolisto kaj kantistoj uzas ĝin por pliligi la voĉon. Estas ja facile kunporti la tubon, kaj botelo da akvo troveblas ĉie ajn. Ĉu vi jam posedas specialan Lax Vox-tubon? Tiam eklernu la metodon laŭ jenaj paŝoj:

JEN KIEL ONI PRAKTIKAS LAX VOX

Bezonajoj: Lax Vox-tubo kaj botelo kun ĉirkaŭ 10 centimetroj da akvo. Ju pli profunde la ekstremo de la tubo estas mergita en la akvo, des pli da rezisto vi sentos kaj des pli peza estos la blovado. Komencu kun la ekstremo de la tubo ĉirkaŭ 1,5 centimetrojn sub la akvosurfaco.

1. PREPARADO

La tuboj estas konservataj en talka pulvoro. Bone lavu la tubon antaŭ la unua uzado.

2. BAZO

- Metu la ekstremo de la tubo ĉirkaŭ 1,5 centimetrojn sub la akvon. Tenu la tubon je ĉi tiu nivelo per unu mano.
- Prenu la alian ekstremo en la buŝon, inter la dentoj kaj loze sur la lango.
- Fermu la lipojn malstrikte ĉirkaŭ la tubon. La vangoj kaj makzeilo restu senstreĉaj.
- Tenu la botelo proksime al la korpo, je alteco de la brusto.
- Sidu rekte.
- Blovu malforte; la akvo ekbobelas.

3. KUN VOĈO

- Diru mallaŭte "uuuuuh" en la tubon, je ajna ton-alto konvena por vi.
- Lasu la vangojn moviĝi tien kaj reen! Variigu la ton-alton de via sono.
- Tenu la makzelon malrigide kaj senstreĉe.
- Kion vi sentas? Atentu la muskolojn, spiradon, pozon, voĉon: sentu kion vi faras.

4. GLITAJ TONOJ

- Kantu glitajn tonojn supren kaj malsupren tra la tubo. Daŭre atentu ke vi sidu rekte kaj ke la vangoj moviĝu kun la blovado!
- Kantu simplajn melodiojn en la tubon je la sono "uuuuuh".
- Eksperimentu pri pli profundaj kaj malpli profundaj pozicioj de la tubo en la akvo.

5. PRAKTIKO

- Dum la aktivigado de la voĉo, malrapide tiru la tubon el la akvo. Krom tio ĉio restu senŝanĝa.
- Ekzercu kun la tubo en la akvo kaj poste malrapide tiru la tubon el la buŝo. Ĉio alia restu senŝanĝa!
- Nombro de 1 ĝis 5, recitu la tagojn de la semajno, diru mallongajn frazojn.

6. ATENTU

- Ne lasu la tubon en la akvo pli longe ol unu tagon!
- Regule prenu freŝan akvon!
- Regule purigu la tubon! Oni povas meti ĝin en la vazar-lavilon aŭ lavi ĝin per varma sap-akvo.

Multegan sukceson!



Monique

DONACO DE BRIAN MOON AL LA KOMPANOJ

Brian Moon, vic-prezidanto de la Akademio de Esperanto, sendis al La Kompanoj tre amuzan, viglan kanzonon. Temas pri traduko, kiun li mem verkis. Jen nova defio por ni! Senhezite tuj malkovru tiun «novan himnon belgan internacian!». Mi kortuŝite ricevis tiun honoron, konsciante, kiel altrangulo taksas nian agadon grava por la movado. Saman senton mi sentis en Lillo (UK 2105), kiam Christer Kiselman, tiama prezidanto de la Akademio, gratulis al ni post la spektaklo, tutkore dankante, ĉar ni donis al li la eblecon aktive partopreni en la sukceso de la vespero, honorigante nian giganton NaturAmiko per speciala diplomo. Ek al ***Kiel duono nun de la belgoj!***

Marcelo

Kiel duono nun de la belgoj (Nova himno belga internacia!)

Jen mi duone fremda ul'
Kiel duono nun de la belgoj
Kaj je duono marokan'
Kiel duono de mia klan'
Jen mi duone enmigru'
Kiel duono nun de la belgoj
Kaj je duono afrikan'
Kiel mia kuz-kompan'.

Kiel duono nun de la belgoj
De Brusel' ĝis Valenci'
Kun kromvojo amerika
Kaj tra tuta Alĝeri'
Kiel duono nun de la belgoj
De Brusel' al Timbaktu'
Kun kromvojo amerika
De l' poluso ĝis Peru'...

Jen mi duone holandan'
Kiel duono nun de la belgoj
Kaj duone irlandan'
Kiel l' angloj duone jam
Jen mi duone portugal'
Kiel duono nun de la belgoj
Kaj parte ja el Senegal'
Kiel francoj sen egal'!

Kiel duono nun de la belgoj
De Brusel' ĝis Valenci'
Kun kromvojo amerika,
Ankaŭ tra Makedoni'
Kiel duono nun de la belgoj
De Brusel' ĝis Perpinjan'
Kun kromvojo amerika
Tra l' baraj' de Asuan' ...
.../...

Mi ja flandras je duon'
Kiel duono nun de la belgoj
Kaj cetere mi valon'
Kiel normala homaran'
Kaj fojfoja bruselan'
Kiel duono nun de la belgoj.
Tio tre amuzas min
Kaj ridadas mi ĝis fin'.

Kiel duono nun de la belgoj




Raphy Rafael, aŭtoro de la originalo



Kie oni vidas, kiel Izengreno deziris konvertiĝi kaj kiel li estis ordinata monaĥo de la abatejo de Tyron

Dum Renardo estas tiel regalata en Maupertuis, dum la prudenta Hermeline (ĉar la damo taksis konvene forlasi sian unuan nomon Richeut por alpreni alian pli mildan kaj pli nobelan) frotas kaj malvarmigas al li la kruojn, dum liaj idoj senhaŭtigas kaj tranĉas la angilojn, sternas ilin sur krado el avelarba ligno kaj delikate metas ilin sur braĝon, subite oni aŭdas frapi ĉe la pordo. Estas Sinjoro Izengreno, kiu, ĉasinte dum la tuta tago kaj nenion kaptinte, espereme sidiĝis antaŭ la kastelo Maupertuis. Baldaŭ la fumo, kiu eliĝis el la supro de la tegmento, atentigis lin kaj, profitante de apertureto inter tabuloj de la pordo, li vidis la du filojn returni sur ardaĵ braĝoj tion, kion li kredas esti bongustaj kotletoj.



Kia vidaĵo por lupoj kvazaŭ mortanta pro malsato kaj malvarmo!

Sed li sciis sian kunulon tiel malmulte bonkora kiel li. Kaj ĉar la pordo estis ŝlosita, li restis kelkatempe lekante siajn barbharojn subpremante siajn avidecajn kriojn. Poste li grimpis ĝis fenestro kaj tio, kion li vidas, konfirmas liajn unuajn malkovrojn. Nun, kiel penetri en tiun ravan lokon? Kiel decidigi Renardon malfermi la pordon?

Li kauriĝas, restariĝas, turniĝas, returniĝas, oscedas larĝe kaj laŭte, denove rigardas, provas fermi la okulojn; sed la okuloj propramove desupre rigardas en la ĉambron al li malpermesitan. «Tamen», li diris, «mi provu kortuŝi lin. He, kunulo, kara nevo Renardo, mi alportas al vi bonajn novaĵojn. Urĝas min diri ilin al vi. Malfermu la pordon!»

Ĉar Renardo facile rekonis la voĉon de sia onklo, pro tio li des pli firme decidis ne aŭdi.

- Malfermu la pordon, kara moŝto, diris Izengreno. Ĉu vi ne volas preni vian parton de la komuna feliĉo?

Fine Renardo, kun pripensita ideo, decidis respondi al la vizitanto.

(daŭrigota)



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 14h30 à 16h30, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi 15h30 à 16h45 (TAP), Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Martine EDELBLOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

mabel1533@laposte.net

* * * * *

**Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al yannickdum@free.fr**

**La venonta kunveno okazos la 16an de decembro je la 10a 30
en Cenon Palmer, okaze de la Zamenhof-tago.**

